



Programo de la turismaj ekskursoj 2013

7an de julio :

libera mateno por piediri en la chirkauajhoj,
posttagmeza ekskurso al Cheffes :

- Vizito de la kastelo Plessis-Bourré apud la urbeto Cheffes (grupa tarifo 7€); la kastelon dum la 15a jc. konstituigis Jean Bourré, ministro de reĝo Ludoviko la 11a ; la kastelo spegulas la transiron de mezepoko al renesanco
- Reveno al Baugé por malkovri la kastelon de la reĝo René de Anĵuo kaj la apotekon (grupa tarifo 5€ , 3€ infano ≤14 jaroj)

8an de julio :

tuttaga ekskurso al Angers kaj Fontevraud, pikniko aŭ restoracio apud la rivero Loire che la kastelo Monsoreau

- Mezepoka kastelo de la urbo Angers malantaŭ blanka kaj nigra ĉirkaŭmuro kun 17 turoj ; intene oni malkovras la tapetaron pri Apokalipso mendita de reĝo Ludoviko la unua de Anĵuo ĉirkaŭ 1370 (6,50€)
- Murtapiŝo « Kanto de la mondo » en la muzeo Jean Lurçat en Angers(3€), teksita en Aubusson (urbo de centra Francujo) de 1957 ĝis 1966, ĝi spegulas la tapetaron mezepokan por esprimi kosman vizion pri Homo en Paco kaj Gloro
- Promenado tra la urbocentro de Angers al la katedralo Saint-Maurice. La skulptaĵoj de la sanktulo kaj kunuloj en kostumoj de la 16a jc. Krome belega aro de vitraloj de la 12a ĝis 16a jc., kiu ebligas kompreni la evoluadon de la vitralarto

- Abatejo de Fontevraud : 900 jaroj da historio, grandega bieno por monaĥoj kaj monaĥinoj sub la aŭtoritato de virino, « la abatino », ekde la 12a jc. Dum la regno de Ludovika la 1a (17a jc.), nobelaj junulinoj ricevis tie kristanan edukadon. Napoleono la unua ordonis la fermon de la abatejo por transformi ĝin al malliberejo kie oni nombris ĝis 2000 viroj ; la liberejon oni fermis nur en 1963 (6€)

9an de julio :

tuttaga ekskurso al Langeais, Azay le Rideau kaj Chinon

- En la urbeto **Langeais** renkontu la reĝon Charles VIII kiu edziniĝis kun Anne de Bretagne en 1491 en la kastelo Langeais (6,20€)
- Apud Langeais, situas la fama kastelo de la urbeto **Azay-le-Rideau**, la juvelo de la renesancaj konstruaĵoj (6,50€)
- Reĝa fortikaĵo de Chinon kie Jeanne d'Arc renkontis la reĝon Charles VII en 1429 (5,50€)

10an de julio :

posttagmeza ekskurso al Rocheminier kaj Brissac (alia ebleco kastelo Le Lude)

- Troglodita vilaĝo Rochemenier : malkovru vivlokojn kaŝitajn en la kalkaj rokoj, preĝejon, kuirejon, vestejon ktp.(4€)
- Kastelo Brissac : la plej alta kastelo de Francujo kun 7 etaĝoj kaj 204 ĉambroj, stranga miksaĵo de konstruaĵoj el 15a jc. (mezepokaj turoj) kaj 17a jc. (nova fasado ne finkonstruita). La familio kiu posedas ĝin hodiaŭ, estas posteuloj de la nobelo kiu aĉetis ĝin en 1502. La kastela parko estas aparte vizitinda(5€)
- Anstataŭ kastelon Brissac, oni povas fari boatpromenado « Luaro Sovaĝa » ekde ŝipejo en la urbeto St.-Mathurin-sur-Loire, oni observas i.a. kastorojn kaj ardeojn (8,50€)
- Abatejo Notre Dame de Cunault, romanika arto en urbeto Cunault

11an de julio :

tuttaga ekskurso al Amboise kaj Chenonceaux

- La reĝo Charles VIII naskiĝis en la kastelo de la urbo **Amboise**, konstruigis reĝan logejon per italaj laboristoj kiam li ekregis en 1491 (komenco de la franca renesanco) kaj mortis tie pro frapo sur la supra sojlo de pordo! Vi renkontas Leonardon de Vinĉi kaj la lastan reĝon kiu vivis en Luar-kastelo, François I (7,90€)
- Proksime de Amboise, situas la kastelo de la komunumo **Chenonceaux**, nomita la kastelo de la damoj, tie vivis Diane de Poitiers kaj Katarina de Mediĉoj (8,50€)

12an de julio :

tuttaga ekskurso al Blois kaj Chambord

- La reĝo Louis XII naskiĝis en la kastelo de urbo **Blois**, li edziniĝis kun la dukino Anne de Bretonujo kiam Charles VIII mortis sen heredanto kaj ili loĝis precipe en tiu kastelo. François I, la postsekva reĝo, konstruigis novan alon en renesanca stilo(7€)
- Proksime de Blois, situas la grandioza kastelo **Chambord**, konstruita de reĝo Francisko la 1a, ne por loĝi, sed por ripozi post ĉasado en la granda arbaro. Provu observi aprojn kaj cervojn tie (8€)